FN PER ANC 47

Normanda Esperanto Bulteno

ESPERANTO

Organe de l'Union des Esperantistes de Normandie
- N° 50 - - Junio 1958 -

Redaktas G.MAMMAUX, 27 Rue Jules Ancel LE HAVRE-S.Mme

# KONGRESO

La konatiĝa vespero de la 2-a de Majo malfermis la 28-an Normandan Kongreson kiu ekis sub signo de ĝojo.

Prezidantino BELLETRE, talente direktis ĥoristinaron, organizis aplaŭdindan teatraĵon bone ludita de la grupo de Pacy-sur-Eure, unuvorte kreis agrablan atmosferon kiun la partoprenintoj forlasis je la 4 horo nokte...

Muzikistoj lerte dancigis la gekongresantojn kaj komi tato elektis Fraŭlinon ESPERANTO-I959, laŭ la plej valoraj respondoj pri gramatikaj demandoj, oni akiris tiun-ĉi rezultaton :

| | | |
|---|---|---|
| Reĝino | : | F-ino Nicole JOLIE (Evreux) |
| Honor-Fraŭlonoj | : | F-ino Yvette MESLE (Evreux) |
| | : | F-ino Monique LEGROS (Fécamp) |

Longa aplaŭdo salutis tiun agrablan vesperon zorge organizita de S-ino BELLETRE, F-ino MONTAGNE, S-ro TRAGIN S-ro VILLETTE, S-ro MONTAGNE kaj F-ino CHERVIN.

* * * * *

Dimanĉo, 3-a de Majo, la Kongreso komencis je la 9-a 30. La partoprenintoj kantis la Himnon "La Espero". S-ino BELLETRE prezidantino de la Kongreskomitato kore akceptis la kongresistojn, dirante ke okaze de la Kongreso, la ebroica grupo ricevis poŝtkartojn el ĉiuj landoj.

S-ro Maurice HUET, Prezidanto de U.E.N. prezentas la moralan raporton dirante ke oni estas malproksime de sia "revo" : "....starigi kursojn, po unu en ĉiu kantono, ĉar kiam oni rigardas la mapon de nia regiono, oni rimarkas ke multaj partoj estas nudaj, sen steletoj indikante ke, tie, estas ĉu grupo aŭ kurso..." kaj li finas : "... Same kiel formikoj, ni devas labori senĉese. Ni ne estu nur pasivaj geesperantistoj, sed tiaj veraj pacbatalantoj kiujn estas volinta Zamenhof. Eble ni ne vidos la belan tagon de la fina venko, sed, ni neniam forgesu ke, laŭ citato "Nuntempe ni laboras por buboj nun dormantaj"...."

S-ro LETENDRE, anstataŭante sian edzinon, prezentis la monan raporton kies rezulto sekvas :

| | | |
|---|---|---|
| En kaso en Majo I958 ..... | I3.432 | |
| Enspezoj ..... | 35.26I | |
| Elspezoj ..... | ------ | 20.4I5 |
| | 48.693.- | |
| En kaso en Majo I959 ..... | ------ | 28.278 |
| BILANCO ..... | 48.693.- | 48.693.- |

La mona raporto estas aplaùdata, kaj poste, S-ro LETENDRE finis dirante : "...La plialtigo de la kotizo estis granda sukceso, ĉar nia financa situacio estas ege bonsama. Dankon al ĉiuj, al la donacintoj kaj frupagintoj precipe."

## R A P O R T O J   D E   L A   G R U P O J

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

<u>ROUEN</u> .- S-ro JOUIS anoncas ke kursoj funkcias precipe en Sotteville-les-Rouen, kie ekzistas kurseto de fervojistoj krom la oficialaj kursoj.

<u>LE HAVRE</u>.- S-ino AMIARD diras ke okaze de la lasta loka komerca foiro, la grupo disdonis "amason da papero" sed ne multe sukcesis. Plie propagandiloj estas senditaj en ĉiu lernejo. Unua, dua kaj tria kursoj funkcias en Le Havre kun malmulte da gelernantoj kaj amuzige S-ino AMIARD diris"... Kvalito pli valoras ol kvanto".

<u>PACY-SUR-EURE</u>.- S-ro TRAGIN diras ke kurso funkcias ĉiudimanĉe.

<u>BAYEUX</u>.- F-ino CHERIE diris ke du familioj eltiris infanojn el la lernejo ĉar ŝi zorgis nur pri esperanto !
Ŝi proponas :-Pripensi pri helpo al gelernantoj por ĉeesti kongresojn.
-Rekompenci la geinfanojn kiuj lernas Esperanto.
Ŝi petas specialan propagandon en BAYEUX kie ĝi estus tute necesa substrekante la fakton ke la estraro ne estas favora.

<u>FECAMP</u>.- S-ro PERMANNE raportas ke por marki la Zamenhofan jaron, kaj komprenebble post multaj penoj, la grupo fine sin oferis magnetofonon. Ek de la venonta lerna jaro, oni do instruos nian karan lingvon uzante tiun modernan instruilon.

<u>HONFLEUR</u>.- S-ro HULLIN estas izolulo, tamen li instruas nian lingvon al unu lernantino.

<u>SAINT LAURENT DE BREVEDENT</u>.- S-ro LETENDRE parolas pri la "Verda Valo" grupo kaj diras ke kursoj regule funkcias.

<u>MEZIDON</u>.- S-ro CHATELAIN bedaùras ke kurso ĉesis ne plu estante batalantoj.

LES ANDELYS.- S-ino VINCENT organizis propagandan ekspozicion sed bedaùrinde neniu enskribigis al la kursoj.

CAEN .- S-ro FERET anoncas ke filatelia sekcio estas fondita en la Seminario en Caen, tiu sekcio rapide kaj vigle ekkaptis la intereson montrante markojn kaj tiamaniere Esperanto kurso funkcios venontan jaron.en la seminario.

S-ro DUTHILLEUL malfermis kurson publikan, sed bedaùrin devis eliri el Caen.

E K Z A M E N O J

Ekzamenoj okazos en ROUEN la 7-a de Junio I959 je la I3-a H.30

KONGRESO I960 : Oni proponis VIRE aù BAYEUX sed nenia decido okazis. S-ro BOSC klopodos pri tiu afero.

ELEKTO DE LA NOVA KOMITATO

Estas elektitaj : F-inoj CHERIE,MARIE kaj MONTAGNE
S-roj FERET,HUET,LETENDRE,MAMMAUX,POTTIER
SAPEYRAS

Post sekreta diskuto, la komitatanoj decidas le sekvantan oficaron :

| | | |
|---|---|---|
| Prezidanto | : | S-ro HUET |
| Vicprezidanto | (Nord) | S-ro POTTIER |
| -"- | (Sudo) | S-ro SAPEYRAS |
| Sekretario | | S-ro MAMMAUX |
| Kasisto | | S-ro LETENDRE |
| Administrantoj | | F-inoj CHERIE,MARIE kaj MONTAGNE |
| | | S-ro FERET |

FERMO DE LA KONGRESO : Post fotografo, okazis familia manĝado kaj post promenado en EVREUX, ĉiuj denove kunvenis por adiaùi unu la alian kaj diri :

"Ĝ I S  L A  R E V I D O"

*Nia Vivo*

FECAMP : De la Universala Kongreso en Bournemouth (I949), ĉiujare la loka grupo estas reprezentita ĉe tiu fama manifestacio Ankoraù venontan Aùguston, unu Fekampanoj forveturos Varsovion.

DOMFRONT : Priparolado de S-ro BOSC en Urbdomo la I4-a de Majo antaù eminentuloj (Urbservoj, turismofico, gazetistoj) prezentita de S-ro VERON, U.E.A. delegito. Dek aùskultintoj enskribiĝis pri venonta kurso. Dankon al la gesamideanoj kiuj sendis materialon por la bela ekspozicio.

PROPAGANDA TAGO EN ROUEN - la 7-a de Junio

Je II h.- Hotel de la Poste, 72 Rue Jeanne d'Arc, S-ro François BOSC, Kabineta Direktoro de S-ro Prefekto de Mara Sejno, transdonod oficiale al S-ro Marcel BOSC la "Croix du Mérite Touristique" sub la titolo de la praktika uzado de la Universala lingvo Esperanto.

Je I4 h.- Okazos ekzamenoj : Atesto pri lernado kaj pri kapableco, 34 Rue de Buffon. Bonvolu enskribiĝi ĉe la Direktoro de la ekzamenoj, S-ro JOUIS, 67 rue Georges Mugnier, BOISGUILLAUME (Seine-Maritime).

☆ Esperanto ☆
Turisma Servo

Pri la ordeno de nia Honor Prezidanto, ni volas presigi kion diris S-ino BELLETRE okaze de la malfermo de la lasta Normanda Kongreso en Evreux:

......"Unue mi deziras saluti la tre viglan Honor prezidanton, S-ro BOSC, kiu pere de leteroj multnombraj, vizitoj, konsiloj, senlace vigligas la kuraĝon de la grupestroj. Vi scias ke jam de kelkaj jaroj viola rubando ornamas lian veŝton, sed ĉu vi rimarkis ke dua rubando venis akompani la unuan? Estas la "Mérite touristique" honore je liaj klopodoj en turismaj aferoj per Esperanto. Kompreneble, mi gratulas tre varme S-ron BOSC je la nomo de ĉiuj esperantistoj kiuj fieras vidi la instancojn konsideri nin pli kaj pli serioze..."

La estraro de la Normanda Unuiĝo kaj la Normanda Bulteno tutkore gratulas S-ron BOSC kaj petegas ĉiujn geesperantistojn, ĉu ĉeesti la ceremonion, ĉu skribi gratulajn kartojn je la sekvanta adreso :

S-ro Marcel BOSC
32 Rue du Cours
SOTTEVILLE-LES-ROUEN (Seine-Maritime)

* * * * *

KORESPONDU - Kelkaj Japanaj samideanoj deziras korespondi. Petu adresojn al la Bultena eldonisto.

* * * * *

AMIKA RENKONTIĜO La 2I-a de Junio okazos kuniĝo en Jumieges ĉe bordo de la Sejno. Petu programon al la sekretario S-ro MAMMAUX.

ALVOKO La sekretario petas de la grupestroj la informojn pri :

I°- Nombro de novaj lernantoj de la grupo kaj nomoj.
2°- Nombro de aktivaj membroj de la grupo.
3°- Nombro de Esperantistoj konataj en la urbo aù vilaĝo Antaùdankon.

L A   V O J O   A L   S U D O

Per malfacila senlaca batalado, Esperanto, paŝo post paŝo kreskis kontentige en Norda parto de nia regiono.

Plurfoje la Komitato provis ampleksigi la Movadon en Suda parto... sed ĝis nun, ĝi ne trafis sian celon.


Hodiaù, la klopodoj devas esti direktataj al :

MANCHE - ORNE - CALVADOS

kaj la venonta normanda kongreso okazos dum Majo I960 en Suda parto.

La "Nordanoj" havos tiam helpon de nova vojo :

L A   P O N T O   E N   T A N C A R V I L L E



I N F A N A Ĵ O J ( Nº 2 )

BROŜUROJ VERKITAJ KAJ ILUSTRITAJ DE LA INFANOJ

Eldonejo de la Moderna franca lernejo CANNES (A.M.)

HISTORIO DE LA KNABETO SUR LA MONTO ( sekvo )

LA LIGNO DOMO DE JUSTIN

Justin eniras sian lignodomon. En ĝi estas freŝe. Rapide, Elisa ekbruligas gajan fajron kaj preparas poton da varma kafo.

Justin vidas la lignan liton, kiun oni tuj plenigos per freŝa pajlo, la kofron, kie oni tenas la manĝoprovizojn, la bufedo, kie oni ordigas la manĝilaron.

Li sidiĝas sur la benkon, ĉe la tablo. Elisa faras balailon per larikaj branĉoj.

LA BONAJ TAGOJ SUR LA MONTO

Ho ! la belaj tagoj sur la monto.

Justin ellitiĝas malfrue. El sia liteto, li aŭdas Elisa, kiu melkas la bovinojn kaj elirigas ilin el la bovinejo riproĉante ilin.

Poste li ellitiĝas; li iras sin lavi ĉe la fontano; la malvarma akvo vekas lin.

La tutan tagon, li estas ekstere.

Li kolektas vakciniojn en la arbareto. Per ili li plenigas siteleton. Li manĝas plenmanojn da ili.

Li ĵetiĝadas sur la teron ridante kiel frenezuleto.

Iun tagon, li hakis sekan arbeton, kiun li alportis sur sia dorso, Elisa estis kontenta.

SERĈANTE LA BOVINOJN

Ĉiuvespere, antaŭ la nokto, estas necese ir i por serĉi la bovinojn.

Kelkfoje ili estas sufiĉe malproksime sur la monto; sed ili ne tre malproksimiĝas unu de la alia. Kiam oni vidas unu oni estas certa, ke ĉiuj aliaj ĉeestas.

La etaj paŝtistoj atente aŭskultas.

La vento alportas al ili sonon de sonoriletoj. Jen ili ! Kelkaj, kuŝantaj sur la herbo, malrapide remaĉas; aliaj ankoraŭ manĝas.

Rapide oni arigas ilin :

-" Ha ! Rujo ! Ha ! Burelo ! Antaŭen..."

La sonoriletoj tintas.

La bovinoj malsupreniras sur la vojeto.

(Tradukis el la franca: S-ino VINCENT Av.de Gaulle, LES ANDELYS)